

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Adreso: Poŝtkesto 233, SOFIA, Bulgarujo

Jaro XVI

Novembro-Decembro 1934

№ 3-4



La monumento
de la Bulgara
Libereco
(sur la Balkano)

Nia unua devo

La nova esperanta jaro jam komen-
ciĝis. Kelkaj el ni iom forlasis nian lin-
gvon jam de la printempaj esperantaj
kursoj, aliaj iomete somerumis kaj estis
feliĉuloj, kiuj paske festis nian XXI-an
en nia Meko (sur insulo „Esperanto“).
Tiel aŭ aliel, ni iom refreŝiĝis, kaj nun
ni sentas la kreaĵon bezonon akceli nian
komunan aferon. Kiel?

Certe vi legis pri novaj metodoj, kiuj
estis rekomenditaj dum nia lasta kon-
greso. Tamen ni dezirus rememorigi, kla-
rigi kaj akcenti malnovan, sed eterne
novan rimedon: laŭeble fru aliĝi al
Bulgara esperanta asocio kaj
samtempe aboni ĝian organon
— „Bulgara esperantisto“. „Tamen
tio ja estas tro simpla, eta kaj
facila“, kontraŭos iuj! „Kiu ne povus
baldaŭ sendi 20 levojn por la individua
grupo de BEA (se ne ekzistas loka es-
peranta societo) kaj tiom por nia bonen-
hava, belaspekta kaj stimulgiga BE?“ —
Ĉiu. „Ni faru unue ion pli komplikan, pli
penigan, sed ankaŭ pli efikan. Tial ni
prokrastu nian aniĝon kaj abonon ĝis
antaŭ la Landa kongreso aŭ ni tute re-
zignu dum ĉi-tiu jaro.“ Sed kiaj estos la
sekvoj de tiu prokrastado aŭ neago? —
Tion, karaj samideanoj, permesu al mi,
rakonti al vi laŭ mia propra sperto.

Iuj el vi rememoras, ke antaŭ tri
jaroj multaj el vi bonvolis estigi min cen-
tra komitatano. Miaj kolegoj dum sia
unua kunveno estis fidintaj al mi la po-
stenon de vicprezidanto. Mi iris al la dua
kunsido kun laca korpo, maldolĉigita ani-
mo kaj malfortigita volo pro mia profes-
sia staĵado. Dum la menciita kunveno
mi estis agrable kaj viglige stimulita de
la larĝaj organizkonoj de niaj sofiaj sam-
ideanoj, de ilia verve labori kaj de ilia
flua kaj korekta parolo. Tiam mi kvazaŭ
duŝis en kristale pura kaj refreŝiga ba-
nejo, ne nur porkorpa, sed ankaŭ por-
mensa. Kaj mi ne rimarkis, kiel mi estis
forpaŝinta 7 kilometrojn ĝis mia kampa
loĝejo. Tiel mi spertis, ke oni povas esti
transportata „per flugiloj de facila ven-
to“. Miaj kolegoj ne nur lerte oratoris,
sed fruktedone agis. La malnovuloj, kiuj
sciis (s-roj Aktarĝiev, Ada kaj Zahariev)
konsilis, prezentis, admonis kaj la junuloj,

kiuj povis (s-roj Bär, Vasilev, Veliĉkov)
kuris, portis, aranĝis. Tial baldaŭ la ak-
tivo el la provinco estis alvenigita, la bi-
blioteko renaskigita kaj Bulgara
esperanta instituto kreita. En tiuj
temprabaj laboroj mi ne povis parto-
preni kaj vidante la neeblecon labori pli
aktive ankaŭ estonte, mi demandis miajn
kolegojn, ĉu mi rajtas resti inter ili. Nia
prezidanto admonis min „gardi mian po-
stenon“. Tiam mi spertis, kiom bone
estas ne postuli de la ceteraj, sed danke
akcepti tiun malmulton, kion oni povas
bonvole doni. Restinte observi, mi vidis
plue la penadon de la redaktoro (s-ro
Zahariev) varbi kunlaborantojn, verki kaj
kolekti materialon por la organo, korekti
kaj ekspedi. Intertempe la formala vivo
de la Asocio postulis neproduktan, ne-
registreblan, sed sufiĉan laboron. Dume
venis la momento por presigo de la
2-a organa numero. Tiam la malfacilaĵoj
estis pli grandaj, ĉar la eldonisto ne plu
deziris kredite presi. Jam estis tempo,
ke ni apogu nin sur niaj propraj kotizoj,
sed ili ne venis. Komplezuloj kolektis
grandan sumon, tamen la nesufiĉo de
kelkdeko da levoj stagnigis la tutan
aferon! En tiu tempo la sofiaj esp. kur-
soj bone funkciis. Alvenintaj provincoj
certigis nin pri la samo en la tuta lando.
La samideanaro do bone laboris, sed
kial ĝi silentis, ne aniĝis, ne abonis kaj
tiel nur ligis la manojn de mia kolegaro,
kiam antaŭ ĝi staras tiom da laboro?
Ni sentis nin kiel en la aero. De tio in-
dignis eĉ mia observanta moŝto!

Tiam mi ekcerbumis, kiel ni povus
eliri el tiu malagrabra stato. Peti dona-
cojn estus humile. Fari prunton, kiam ni
multe ŝuldis, estis neeble. Anigi kaj abo-
ni niajn organizemajn kaj legemajn sam-
ideanojn, fine mi trafis. „Bonega pro-
jekto“, diris nia sperta Ada, „sed kiel
realigi ĝin?“ Tiu ja estis la ĉiama pro-
blemo. Niaj adeptoj estas fidelaj, sed
malfruas. Ili aliĝas dum la lastaj monatoj
de la financa jaro. Bone, pensis mi, se tiel
estas, tiam ĉiu C. K. devas heredi al
sia posteulo sufiĉan monon por $\frac{2}{3}$ -jara
laboro. Tamen ĉu oni ne rajtas elspezi
sian monon por sia laboro kaj ĉu decas
heredi monon, kiam pezas ŝuldoj? —

Certe ne. Kaj poste, ĉu oni rajtas anigi kaj aboni, ĝenerale igi liberemuleojn konsciaj kaj oferemaj? — Ankaŭ ne. Tiam restas nur unu unika rimedo: ĉiu BEA-ano laŭeble ĝustatempe anigi kaj aboni sin mem. Ĉu ĝi ne estus plej simpla, plej facila kaj samtempe plej efika? Se vi estus ĝin spertinta, vi estus ĝin ĉiam praktikinta kaj neniam vi estus paralizinta la laboron de CK, kiel en la rakontita okazo. Tiam ni ekpensis eĉ pri likvido de la Asocio. Kial vane perdi tempon? ... Kaj ĝuste en tiu kritika momento, kiel la unuaj printempanoncantaj hirundoj, venis kelkaj aliĝiloj. Nu, kolegoj, ni estas perfiditaj! Ni jam havas signon de morala kaj materiala subteno de nia anaro. Ni do streĉu niajn fortojn, ĉar ankoraŭ multe da laboro antaŭstaras. BE estis baldaŭ presita kaj dissendita. Venis nova eho de subteno. Kaj turniĝis plenforte ĉiuj radoj kaj radetoj de la tuta organizaĵo por rikolti la jaran sukceson, la ĝeneralan ĝojon kaj la pruvon por mi, ke efektive la simpla kaj facila rimedo de memaniĝo kaj memabono estas samtempe plej efika asociplifortigilo.

Unu jaron pli poste, kiam oni longe pridiskutis la manieron plifortigi nian Asocion, nia blankbarba prezidanto, s-ro Aktarĝiev, humile kaj admone petegis por unu rimedo: ĝustatempe aliĝo. Kiom klara ĝi estis por mi kaj por tiuj, kiuj havis la okazon „pendi en la aero“, sed kiom eta ĝi ŝajnis al ceteraj! Nia prezidanto ne nur predikis tiun-ĉi rimedon, sed li ankaŭ plenumis ĝin. Lian ekzemlon sekvis fidele fino Noŝarova. Dum la pasinta jaro ni perdis tiujn du modelajn pionirojn. Ni ŝuldas al ili profundan respekton, glorigon kaj monumentigon. La lasta estas malfacila en tiu epoko de ĝenerala malriĉeco. Tamen ekzistas malmultekosta maniero eternigi iun — realigi liajn surterajn aspirerojn. Kaj kiaj estis la aspireroj de niaj du mortintoj? — Forta esperanta movado per forta BEA, per ĝustatempe aliĝo al la lasta. Do, jen ankoraŭ unu stimulo por nia aniĝo kaj abono.

Tiu metodo plej konvenas al individuaj membroj de BEA, ĉar ili ne dependas de lokaj grupoj, sed de si mem,

Ili estos la unuaj stimulantoj. Kaj kiam iliaj alvenintaj kotizoj kaj abonoj estos elĉerpitaj, tiam komencos alveni la sendaĵoj de la grupoj. Tiel la fortalfluo de nia Centro estos bone dispartigita kaj ĝi povus labori seninterrompe, sen stagnado, egale de la komenco de la jaro ĝis ĝia fino. Niaj CK-anoj forte tenas al la plenumo de sia devo, sed ili povus fari tion, nur tiam, kiam ni estus plenumintaj la nian, ĉar ili dependas de ni. Se ni emas ricevi, unue ni devas doni.

Fine, se estas tiaj, kiuj ankoraŭ dubas pri la efikeco de la pritraktita rimedo, mi petas ilin provi ĝin dum la ĵus komenciĝanta jaro kaj de la rezulto difini sian estontan agmanieron.

Mi petas pardonon, ke mi tiom longe skribis pri tiu simplaĵo. Tamen la vivo instruis min, ke nome la simplaĵoj estas efikoplenaj. Bedaŭrinde ni ne atentis la lastajn ĝuste pro ilia simpleco. Tial necesiĝas multflanka, detala kaj rezultelonga klarigado. La potenco de la pritraktita rimedo konsistas en la postulo de persona peno. Tiun penon ni plej facile povus fari, ĉar ĝi dependas ne de aliu, sed de tiu, kiu plej multe nin fidis, sekvas kaj obeas — nia mema moŝto. Tial la greka filozofo Epikur trovis la ŝlosilon de la feliĉo en la memdependeco.

* * *

Do, samideanoj, por plenumi nian esperantan devon (perfektigi nin en esperanto), por plifortigi nian landan asocion kaj la ligitan per ĝi UEA kaj por eternigi niajn pasintajn veteranojn, ni anigu nin laŭeble plej baldaŭ al BEA kaj abonu ĝian organon — BE.

Agro

Ако въ всички държави изучаването на есперанто въ срѣднитѣ училища бѣше задължително, скоро би се казвало: да говоримъ въ къщи на родния, а въ чужбина на международния езикъ!

Оня, когото особено интересуватъ други езици, нека ги учи свободно, никой не му прѣчи.

Проф. Фр. Модриянь.



Al triumfo de Esperanto

(Alegorio)

Mateno. Suno nin salutas.
Ĝiaj radioj varmaj nin karesas,
L' aeron freŝan ni englutas,
Dolĉa hirunda pepo ja ne ĉesas.

El sonĝo la natur' vekigaŝ,
Aromo de freŝeco ekblovetas,
De l' korpo forto elverŝigaŝ,
Mateno ĉarma al ni ekridetas.

Kun en animo festa ĝojo
Ni ĉiuj al okupoj ekrapidas.
Nenia bar' — sur nia vojo.
Laboron kaj progreson ni avidas.

— — — — —

Atendas ni la tagon belan,
La tagon de la homa kunfratiĝo,
Atendas ni la horon helan
De nia Esperanto-sunleviĝo.

P. Jordanov

Geo Milev

Taglibro

Nun tre malfruas jam. Adiaŭ.
(Ĉar multe vin mi amas!)
Sed vin pasie ne ornamos.
(Ĉar tre paliĝis mi hodiaŭ.)

Nun tre malfruas. Ĉio, tuto.
La tag'. La nokt'. Kaj mi. Kaj vi ja.
Kaj la ridet' malfrua, muta,
Verŝita en rigardon vian
Malgaje.

Ho, vesper' vaniĝa!
La kor' misterojn ne atendas.
(Ĉu mi aŭ ĉi-vesper' paliĝa —
Sed la paleco sin etendas!)
Komprenas. Scias. Senmistere.
Nun tre malfruas jame, vere.

Trad. *Steki*

Atanas Dalĉev

Novelo

La fenestrar' fermita kaj obskura, *)
Obskura kaj fermita ankaŭ l' pordo,
Kaj sur la pord' papero kun la vortoj:
La mastro Amerikon forveturis.

Kaj mem mi mastro de la domo, kie
Loĝadas jam nenia homo,
Sed mi neniam lasis ja la domon
Kaj tien mi revenis el nenie.

Neniam mi eliris kaj ĉiame
La jaroj estas miaj nuraj gastoj,
Multoble flavis la ĝardenoj vastaj
Kaj ankaŭ mi ne estas plu la sama.

Jen mi trairis ĉiujn rememorvojetojn,
Delonge ĉiujn librojn foliumis,
Kaj ŝajne jen cent jaroj dum mi
Interparolas nur kun la portretoj.

Tagnokte kaj tagnokte la pendolon
— Metalan sunon — la horloĝo lulas.
Kelkiam mi min vidas la spegulon
Por ja ne esti ĉlam, ĉiam sola.

Kaj sur la muron supreniras lace,
Jam miaj tagoj ĉe l' plafon' forflamas,
Sen ia travivaĵ', sen ia amo,
Sensigne, vane mia viv' forpasas.

Kaj kvazaŭ mi neniam vivis — vanta
Estado, fia elpenaĵ'! Hazarde
Kelkiu se en domon ekridardus,
Neniun tie trovos li vivantan;

Li vidos nur portretojn polvobskurajn,
Spegulon trompan kaj nenionhavan,
Kaj sur la pordo la paperon flavan:
La mastro Amerikon forveturis.

Trad. *Steki*

*) malhela. Red.

Panĉo Mihajlov

Mia najbarino*Al J. W.-a, la tradukinto*

Mi scias: ŝi amis plej multe ol ĉio alia la florojn.

Kaj, tial, printempe ŝi plenigis je ili sian antaŭtuketon el nigra atlaso, supreniris la monton de „La Blanka ŝtono“ kaj de tie, el supre, kun silenta ĝojo ŝi disŝetadis ilin malsupren sur la dometojn kaj la kortojn en la ebenaĵo.

*

Foje, suprenirante la vojeton, ŝin atingis poeto kaj ekvolis ĵeti rigardon en ŝian animon.

— Mi ne havas animon, — ŝi rediris trankvile al li.

Kaj, efektive, ŝi ne havis animon.

Ĉar ŝi konis nek la malbonon, nek la malĝojon.

Alifoje, sur la montopinto mem, aperis pentristo, kun paletro kaj peniko en mano kaj ekdeziris pentri ŝian vizaĝon, pro la grandaj bluaj okuloj.

— Mi ne havas okulojn, — ŝi rediris trankvile al li.

Kaj efektive, ŝi ne havis okulojn.

Ĉar ŝi ankoraŭ ne estis vidinta la grandan papilion de l' amo.

*

Sed kiam iun vesperon proksimiĝis al ŝi juna studento kaj ekdeziris — ne la grandajn bluajn okulojn kaj ne ŝian animon — nur gustumi la varman nektaron de la ruĝaj lipoj, ŝi benis lin.

— Vi amas la vivon! — ŝi rediris karese al li kaj lin kisis.

Trad.: I. H. K.

Kiel mi farigis esperantisto

En 1898-99 mi, juna gimnaziano de Plovdiva gimnazio, eniris en Militan Lernejon de Sofia. Dum la somero de la unua lernjaro mi kaj mia lernejamiko Dimitro Dobruĝanski decidis resti en nia



Ilija Silvestriev

lernejo, promenante libere en ĝia vasta parko, pripensante kaj meditante, kaj legante diversajn librojn. Ĝuste tiam mia amiko havigis al si esperanto-lernolibron de Ĥristo Popov kaj Georgi Oreŝkov, interesiĝis kaj interesigis min pri helpa lingvo internacia. Ni eĉ donis niajn adresojn al nia Majstro kaj komencis lerni la lecionojn.

Dum la nova lernjaro 1899-900 ekinteresiĝis ankoraŭ 2-3 samklasanoj kaj ni abonis la entusmigan kaj belan tiaman gazeton, elirantan en mia naskiĝurbo Plovdiv, „Rondiranto“, eldonatan de s-ro Oreŝkov kaj redaktatan de helpantoj el la vigla klubo „Stelo“.

La vintraj okupoj en la lernejo ne permesis al ni dediĉi multan tempon. Okazis, ke mi vizitis la domon de mia samklasano Stelian Maksimov. Klinita al breto de lia hejma biblioteko, mi rimarkis binditan libreton, denove la „Plena Manokonduko“. Denove vangofrapon mi ricevis... Mi pripensis... Mi meditis... Mia amiko, rimarkinte mian interesiĝon pri tiu libreto, diris al mi: „Se plaĉas al

ci, prenu ĝin". Kaj mi volonte ĝin prenis donace. Jen, de tiu ĉi minuto mi fariĝis sindona esperantisto. Kaj de tiam je ĉiu nova tago kreskis mia intereso al esperanto. Kaj unuafoje dum mia vivo, vizitante Plovdiv'on, mi ĝuis liberan esperanto-parolon kun la modesta poŝtovicisto-telegrafisto Oreŝkov, kun Rajĉinov kaj ceteraj Stelanoj. Pasis tria, pasis kvara jaro en la Milita lernejo. Kaj la 1-an de januaro 1903 mi forlasis ĝin, jam subleŭtenanto, en Ŝumen. Nun mi profundigis en la trastudadon de esperanto. Mi eĉ provis mian plumon kiel tradukanto. tute senperta, kompreneble, de bulgara en esperanton. Mia unua tradukaĵo estis „La nokta gardisto“, kies manuskripton zorge korektis la stelanoj de Plovdiv. Mi komencis korespondi kun esperantistoj de la tuta terglobo.

Deesperanto interesiĝis ankaŭ la nuna edzo de mia fratino Cvetanjo, la unua sekretario de l' fondota de mi grupo esperantista, kaj estonta sekretario de Bulgara Esperantita Ligo — Ksenofono Jankov.

Mi malfermis kurson en la kázerno por miaj pli inteligentaj soldatoj. De tago al tago mi interesigadis pli multe da homoj. Iun tagon, droninta en miaj adjutantaj kaj kasistaj laboroj, mi aŭdas, ke tintilo de telefono alvokas min. Mi levas ĝin kaj aŭdas esperantajn parolojn. Nekonatulo parolas al mi en esperanto, en kiu mi telefone neniam parolis. Eble fremdulo, eksciinta pri mi de la adresaro. Mia lango paraliziĝis. Feliĉe, tiu estis nia sampatro landano, s-ro Dojĉo Kolev, fervojoficisto, translokigita de alia stacidomo en la Ŝumenan.

Mi havigis al mi kelkajn esp. legaĵojn. Eliris nova lernolibro: „Esperanto en dek lecionoj“ de Théophile Cart, nia neforgesebla, brava kaj fidelega probatalinto. Mi aĉetis 20 ekzemplerojn, kiujn mi donace sendis al geamikoj. En 1905 mi estis preta fondi grupon kaj malfermi kurson al civitanoj kaj militistoj. Mi devis peti permeson de mia estraro kiel por la malfermo de l' kurso, tiel por la portado de l' bela verda signo esperantista. Kaj per speciala reĝa reskripto, publikigita en „Militaj Sciigoj“, oni oficiale anoncis, por mia eksterordinara feliĉo kaj admiro, la permeson.

Ĉu vi scias, karaj gesamideanoj, kien mi forflugis post la ricevo de tiu alta permeso? — Baldaŭ mi trovis helpantojn — malgrandan grupeton de kelkaj flamiĝintaj de mia ekinteresiĝo amikoj: Ksenofono Jankov, mia bofrato — gimnaziano, mia fratino Cvetanjo, Ilija Teodorov, Dojĉo Kolev, spertulo, la helpkuracisto Kamilarov, la gimnaziano Vasil Filipov Avĝiev, instruistinoj Careva Dobrev, Stojanka Radeva k. a. Mi malfermis en la knaba pedagogia lernejo la unuan esperanto-kurson. Kaj baldaŭ, en la komenciĝo de 1905 ni fondis esp. grupon „Vekiĝo“. Poste sekvis la organizo kaj partopreno de l' esperanto-kongreso en Tirnovo kaj en Ŝumen, vizito neforgesebla de rumanaj esperantistoj D-ro Robin, subleŭtenanto Savopol, Marinescu kaj vizito al Bukureŝto kaj Sinaja, kongresoj preskaŭ ku intenacia karaktero.

Ni amikiĝis kun rumanaj, serbaj esperantistoj kaj kun reprezentanto de rusa popolo, s-ro N. P. Evstiféiev. Mi korespondadis jam tre serioze kun li, s-ro Th. Cart, leŭtenanto de Saint-Cyr'a lernejo Bayol kaj kun multaj aliaj eminentaj esperantistoj.

En Bukureŝto aperis gazeto „Danubo“, kie laboris nia fidela idealisto N. Ĥristoskov, kiu falis batale en Balkana milito, kune kun mia sekretario Avĝiev, kapabla propagandisto, lektoro kaj stilisto. Multaj, multaj forlasis nin por ĉiam. Inter vivantoj restis mia dua sekretario — s-ro Ilija Teodorov. Mortis ankaŭ Dimitro Kanĉev, ŝumena bonfaranto, kiu estis donacinta eĉ parcelon por „Esperanto-lernejo“.

Ne ekzistas plu la animo de l' studenta esperanta grupo, redaktoro de esperanta gazeto — tre inteligenta juristo kaj sindona esperantisto Ĥristo Rjaĥovski el Levski. Mortis D-ro Robin, la simpatia alta spirito, animo de rumana esperantistaro. Nenion mi aŭdis pri N. P. Evstiféiev!

Kaj ofte, ofte droninta en zorgoj por societaj aferoj kaj por gajno de pano, mi rememoras la neforgeseblajn sonojn, kantitajn en Bukureŝta esperanta kongreso, dolĉajn sonojn de Cart'a verkaĵo: „Mi aŭdas vin.“ „En trankvileco reviganta

Kvazaŭ balzam' en kor' fluanta,
Via parol' sanigas min. Mi aŭdas vin".

Mi devas fini. Kaj finfine diri, ke mi fariĝis de tiam, depost 1903, ne nur fidela, sindona, sed ankaŭ sperta esperantisto. S-ro redaktoro de „Bulgara esperantisto“ kaj lingvokomitato, Ivan H. Krestanov, sendadis al mi siajn tradukaĵojn, kiujn li faris kiel gimnaziano. Kaj li kun Atanas D. Atanasov (Ada) ĉeestis

Bukureŝtan kongreson kune kun mi, mia fianĉino Jordanka (edzino mia), ŝia kuzino Anjo Mateeva, V. Gaŝevski, Ĝ. Oreŝkov, D. Kanĉev, Ksenofono Jankov k. c.

Tempo pasinta... Ni kun li estris eĉ, mi kiel prezidanto, li — sekretario de BEL. Sufiĉe.

Ilija Silvestriev
eksprezidanto de „Vekiĝo“
kaj „BEL.“

Hejme en Bulgarujo

Mia patrujo estas la mondo! La homoj, kiuj min konas, juĝas pri mi diverse. Kelkaj riproĉas, kaj kelkaj konsentas, kelkaj mokas kaj kelkaj silentas. Parenca animo pli facile komprenas ol fremda.



Erich Kilian

Tute nature. Kaj sama fakto valoras pri tuta popolo. Kelkafoje mi eĉ sincere penante ne sukcesas trovi kontakton, kelkafoje mi jam matproksime de la limo flaras ion simpatian en la aero. Tiaj landoj ekzistas. Kiam oni faris la unuajn dek paŝojn sur ilia tero, oni ekstaras kaj spiras profunde, eksciante, ke oni malgraŭ diversaj raso, kulturoj, lingvoj kaj kutimoj ne estas fremdulo. Tio ne estas fantaziado, sed se senanima ŝtupo vojaĝante nenion sentas, ne kulpas mi.

Tia lando estas Bulgarujo. Mi sentas min tie ĉi hejme. Ne diru nun iu ajn malica aŭ tro homkona skeptikulo,

ke mi tion ruze asertas, ĉar mi ĵus troviĝas inter bulgaroj. Jam antaŭjare en Parizo, kiam mi sidis ĉiunokte antaŭ mia kameno, mi vidis en la flamoj la siluon de Mesemvria, la ŝtonegan bordon de l' Nigra Maro, el la kraketado de la ardanta ligno mi aŭdis la noktopreĝon de la soldatoj en Vasiliko, — la tondrantan maron de malproksime. Mi vidis min kiel mi tiam brako en brako promenis kun maristoj de strateto al strateto. Ni nin komprenis, sen vortoj, sen lingvoj. Ni estis pli proksime unu al alia ol fratoj.

La maristoj kantis, la knabinoj kantis, ĉiuj, ĉiuj kantis unu saman kanton; la melodion mi kunprenis kiel heredaĵon. — Kaj kiam mi post jaroj sidis antaŭ mia kameno, el kiu la lasta ardaĵo radias molan ruĝan lumon, mi senkonscie zumas melodion. Gis la lasta fajeto sin kaŝas en cindro, mi zumas la melodion de: Ŝaŭmanta Marica.

Tute mallume estis nun en mia ĉambro. Mi ekstaris, blovis en la kaŝigintan ardaĵon, surmetis freŝan lignon. Kiam sovaĝaj flamoj bruegante heligis tremante mian tablon, mi prenis paperon kaj kraĵonon kaj provis esprimi mian dankan senton al Bulgarujo. Mi surpaperigis, kion mi travivis, renkontante bulgarojn de la plej simpla ĝis laŭvorte plej alta kasto. Mia intenco estis sincera, ĉu sukcesis — pri tio ne juĝas mi.

Kaj nun, kiam mi antaŭ kelkaj tagoj alvenis en Lom per Danuba ŝipo, Bulgarujo min denove mirige surprizis... Estis la dua horo dumnokte, kaj ege malvarme. Tuj mi iris al la stacidomo, sed nur tagmeze veturis la vagonaro. Kion fari? En la atendejo mi preparis min

por atendi la matenon kaj frostis. Post nelonge venis fervoja laboristo, kiu min invitis lin sekvi. Li gvidis min en bone hejtatan ĉambreton kaj montris kanapon. Dormu, li diris pergeste. Poste li metis surtuton sur la teron kaj kuŝiĝis sur ĝin. Mi volis protesti, sed li fermis la okulojn kaj dormis.

En Sofia mi renkontis la personan kaŭzon de mia esperantisteco. Pro la maristoj, kiuj deĵoras je la bordo de la Nigra Maro, kiuj min ofte demandis: „Ĉu vi parolas esperanton?“, mi, hejmen reveninte, ĝin lernis. Kaj la marsoldatoj estis lernantoj de s-ro Krestanov, kiu min afablege akceptis en sia hejmo Sofia. Mi do estas lia esperanta nepo. Se li ne estus instruinta la maristojn, mi hodiaŭ ankoraŭ starus ekster la vicoj de l' Verda Stelo.

Mi scias, ke mi ŝuldas dankon al li, kaj mi esperas, ke li akceptas mian promeson rakonti ĉiam kaj ĉie pri Bulgarujo. En ĉiuj landoj kaj lokoj, tra kiuj mi vojaĝos, en kiuj mi restos.

Kiam mi revenos al Eŭropo, mi venos Bulgarujon. Kaj se oni eksterlande min demandas: Kial? mi respondos: Ĉar, tie, en Bulgarujo, mi sentas min hejme.

Erich Kilian

Rim. de la red. Kun plezuro ni aperigas la bildon kaj artikolon de nia samideano kaj gasto Erich Kilian, la aŭtoro de la verketo „La Mondon al ni!“, pri kiu niaj legantoj legis kaj legos en „B.E.“

Zamenhofaj Vortoj

Pri unueco

Per unueco ni pli malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigos nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune (Krakovo, 1912).

Ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj aŭ gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa unueco, por ke ni akiru por nia afero la konfidon de la mondo (Cirk. Letero, 1908).

De la Esp. Akademio

Kvina oficiala aldono al Universala Vortaro

(radikoj akceptitaj de la Lingva Komitato)

aviado — arto aerveturadi per aparatoj pli pezaj ol aġo, vĉzduhoplavanĉe.

bremzo — mekanika aŭ elektra aparato por malakceli, haltigi aŭ reguligi movon aŭ funkciadon de maŝino, спиpачка.

bulteno — perioda informilo de societo, бюлетинъ.

fono — efektive ebena aŭ, pro malproksimeco, ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas aŭ elkontrastas, фон(д)ъ.

kabineto — 1. Ĉambro destinita al intelekta laboro, работна стая; 2. speciala ĉambro, kie oni ekspozicias sciencajn aŭ artajn kolektojn, изложбена стая; 3. ministraro, министерски съветъ.

pilo — fonto de elektra energio, uzanta la transformiĝon de kemia energio, галванична батерия.

plagiato — nelojala faro de tiu, kiu prezentas sub sia propra nomo verkon aŭ parton de verko, kies aŭtoro li ne estas, литературна кражба.

slipo — kartona aŭ papera folieto, facile ordigebla, sur kiun oni skribas iun poton, картонче.

I. H. K.

P A G U V I A N A B O N O N !

Б. Е. С. — Окръжно № 81 отъ 20. XI. 1934

Драги съидейници,

1. Централниятъ комитетъ като взе предъ видъ тежкото финансово положение на съюза и следъ като констатира, че въпрѣки окръжнитѣ до съюзнитѣ дружества да се отчетатъ, само нѣколко дружества до сега сж внесли суми, а именно: Софийското, Русенското „Espero“, Търновското „Lumo“ и Т.-Пазарджишкото „Radio“, реши да отправи настоящето окръжно до ръководителитѣ на съюзнитѣ дружества, на които да обърне най-сериозно внимание върху този фактъ и ги помоли за навременна финансова и морална подкрепа и съдействие.

Срѣдствата на съюза сж оскъдни. Членоветѣ на централния комитетъ събраха помежду си суми, за да се издаде първиятъ брой отъ „Булгара есперантисто“. Освенъ материални жертви, всички тѣ работятъ безвъзмездно за преуспѣването на съюза.

Нека най-после съюзнитѣ дружества преценятъ тѣзи усилия на централния комитетъ и приобщавайки силитѣ си къмъ общото дѣло, да излѣзатъ отъ тази престъпна инертностъ, която не е присъща на насъ — есперантиститѣ.

2. Съгласно конгресното решение, Българскиятъ есперантски съюзъ трѣбва да стане колективенъ членъ на У. Е. А., като се заплаща по 25 шв. фр. годишно (около 700 лева). Въ изпълнение на това решение, съюзнитѣ дружества трѣбва да внесатъ по 50 лева годишно, която сума да изпратятъ въ най-скоро време.

3. Въ духа на конгресното решение, централниятъ комитетъ отправи писмо до г. министра на народното просвѣщение, съ което го помоли да нареди до училищнитѣ власти да даватъ улеснения на лекторитѣ по есперанто, както и да се отнасятъ благосклонно къмъ есперанто и есперантскитѣ курсове. Съ писмо № 5748 отъ 10. XI. т. г., министерството отговори, че за всѣки конкретенъ случай трѣбва да се иска отдѣлно разрешение за откриване курсове по есперанто за учащи се.

Затова, ония дружества, които възнамѣряватъ да откриятъ курсове за учащи се, да ни съобщятъ това, както и името на лектора, за да искаме необходимото отъ министерството разрешение.

4. За доброто администриране на съюза, изпращатъ ви се специални формуляри, които попълнени да ни се връщатъ при всѣко изпращане на суми за членски вносъ.

5. За да се даде тласкъ на есперантското движение въ страната и се обърне вниманието на обществото, както и да се създаде интересъ къмъ есперанто, централниятъ комитетъ реши да се организира повсемѣстна агитационна зелена седмица отъ 13. до 20. декемврий т. г., която да съвпада съ рождения денъ на д-ръ Заменхофъ — 15. декемврий. Значението на зелената седмица е грамадно, защото указва голѣмо въздействие и оставя въ публиката впечатление на организираностъ и внушава вѣра за широкото разпространение на езика.

За самитѣ есперантисти зелената седмица е празникъ, презъ който тѣ най-много работятъ. Презъ тази седмица тѣ иматъ само единъ девизъ: „Al laboro“. Тѣ стѣгатъ редоветѣ си, събиратъ сили и се готвятъ за културната борба, която имъ предстои.

Презъ зелената седмица всѣки есперантистъ трѣбва не само той самиятъ да се отчете и плати абонамента си, но да привлѣче нови хора въ движението и запише най-малко поне двама нови абоната.

Съюзнитѣ дружества трѣбва да използватъ всичко, за да проведатъ най-успѣшно зелената седмица: да съобщатъ за това въ мѣстната преса; да публикуватъ статии и съобщения за есперанто; да уредятъ публични сказки, изложби, забави, вечеринки и пр.

Освенъ тѣзи срѣдства, афишитѣ се явяватъ като ценно пропагандично срѣдство, особено за селата и малкитѣ градове. Всѣки може да си представи каква

гледка преставляватъ и какъвъ интересъ възбуждатъ разноцвѣтнитѣ афиши въ тѣзи малки градове и села.

Тѣкмо за това централниятъ комитетъ реши да се издадатъ подобни афиши, които да сж еднакви за цѣлата страна.

Ето защо всѣко дружество да изпрати известна сума до съюза, срещу която ще получи съответното число афиши. Тамъ гдето нѣма дружество, нека мѣстнитѣ есперантисти, било двама, трима или повече, събератъ помежду си колкото могатъ пари и ги изпратятъ до съюза, срещу което ще получатъ съответното число афиши.

Сумитѣ да бждатъ изпратени пай-кжсно до 5. декемврий.

По случай зелената седмица и рождения денъ на Заменхофъ, на 15. декемврий, ще говори предъ радио София нашиятъ съидейникъ Атанасъ Д. Атанасовъ — Ада, членъ отъ централния комитетъ.

Ако нѣкои дружества искатъ сказчици отъ централния комитетъ, трѣбва да изпратятъ съответнитѣ пжтни пари.

6. Отново ви обръщаме вниманието, щото всички суми да се превеждатъ чрезъ пощ. чекова смѣтка № 1133, защото преводѣтъ е по-евтинъ. Такава служба има уредена при всѣка т. п. станция.

Всички писма да се адресиратъ: Български есперантски съюзъ. Пощенска кутия № 233 — София.

Накрай, ние ви заявяваме, че сме готови да работимъ съ всички сили за дѣлото на есперанто и да не жалимъ трудъ и време, но искаме и вашата подкрепа, която не ще бжде голѣма: да чувствувате организацията своя и да платите абонамента и членския си вносъ.

Приемете нашитѣ есперантски поздрави.

Председателъ: П. ИОРДАНОВЪ

Секретарь: Б. Т. ОКТОМВРИЙСКИ

Есперантски новини

Централниятъ комитетъ на Бѣлг. есп. съюзъ направи постжпки предъ Българския *радио-съюзъ*, въ резултатъ на които се получи писмо подъ № 259 отъ 6. X. т. г., съ което ни се разрешава всѣко 15 число на месеца да има сказки за есперанто-пропаганда.

Централниятъ комитетъ сърдечно благодари на управата на Българския радио-съюзъ за указаното ни съдействие.

Римъ 1935 — *Най-интересниятъ есперантски конгресъ*. Италианскитѣ есперантисти вече съобщаватъ за една особено богата и интересна програма на 27-ия всесвѣтски конгресъ. Той ще почне на 3. авг. въ *Флоренция*, на 4. ще се пжтува за *Римъ*, дето на 5. ще стане тържественно откриване, на 8—10. ще продължи въ *Неаполъ*, на 11. ще се отплува за *Сицилия*, на 12. въ о-въ *Малта*, на 13. въ *Триполитания* (Африка), на 14. по море, на 15. въ *Палермо*, на 16. въ *Портоферайо*, на 17. въ *Генуа*. По желание ще има и други излети. Кон-

гресната вноска е 100 италиански лири. Ако се платятъ до 13. I. 1935 има 30% отбивъ, до 30. IV. 1935 — 20%, до 30. VI. 1935 — 10%, а цѣлото пжтешествие презъ Италия ще струва за конгресисти 490 лири или около 3500 лв. За повече подробности пишете до: Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano, Italujo.

Есперантски имена е дала френската аптека въ Bouge en Grasse на произвежданото отъ нея усилвателно вино „Fortiga“ и противогрипно срѣдство „Vagta“; *химическата фабрика* въ Амстердамъ лепи обяснителни надписи на есперанто върху пакетитѣ на своитѣ произведения, а *трионната фабрика* въ Purgstall (Австрия) е издала ценоразписъ на 6 езика, въ който есперанто заема мѣсто на пръвъ чуждъ езикъ.

Фолклористи употребяватъ есперанто. — Голѣмото презморско предприятие на г. Jackson Coleman отъ Лондонския литературепъ институтъ, зами-

наль недавна съ параходъ къмъ севернитѣ страни, е било най-добре обслужвано отъ есперантиститѣ почти въ всички градове по лжтя си.

Есперантски класъ е образуваль директорътъ на обществения отдѣлъ г-нъ Максимилианъ Вилареаль, въ капитола (събранието) на депутатитѣ на Североамериканскитѣ съед. щати.

Радио-журналъ Бърно, Чехословакия, ни праща есперантската си програма за 7. ноемврий, 22.15 ч. Моли съидейницитѣ да му се обадятъ, като сътова засвидетелствуватъ интереса си отъ „зелената станция“.

Есперантската оригинална книга „Fine mi komprenas la radion“, ридиотехническо съчинение отъ инж. Eŭgeno Aisberg въ Парижъ, е преведена на 12 езика, между които и на български.

Есп. въ радиото. Краковъ и Варшава сж станциитѣ, които редовно всѣка седмица предаватъ есп. програма. Скоро това ще правятъ и станциитѣ въ Львовъ, Катовиць и др. Слушайте ги и благодарете на: **Polskie Radjo, Warszawa.**

Много фирми и банки рекламиратъ на есперанто и намиратъ клиенти въ цѣлия свѣтъ. Издава се за тая цель и есп. списание въ 13000 екз. „**La Komercio**“ въ Dresden—Radebeul, Friedrich—Auguststr, 4, Germanujo.

Праздничниятъ пжтеводителя на Гандъ—града на цвѣтята—е издаденъ въ 10,000 екземпляра на 3 езика; френски, фламандски и есперанто.

Белгийскиятъ кралъ Леополдъ III е приелъ почетеното председателство на Белг. есп. съюзъ. Белгийскитѣ есперантисти си иматъ вече собственъ Esperanto-Domo, Willemsstrato 21, Antverpeno, въ центъра на прочутото всесвѣтско пристанище.

Есперанто и електрицитѣ. Терминологиятъ отдѣлъ на международната електрическа комисия на събора си въ Парижъ 25—30 юний т. г. е решила да издаде речникъ на електротехнически термини на есперанто.

Споредъ каталога на есп. преса до сега сж излизали 1276 есп. вестници и списания, отъ които 660 не сж преживѣли втората годишнина. Сега излизатъ едва стотина въ всички крайща на земното кълбо. Освенъ това 170 нацио-

нални вестници иматъ постояненъ есп. отдѣлъ. На други проекти за междунар. езикъ е имало 195, отъ които днесъ почти никой не излиза.

Шведската филмова компания е представила на публиката презъ августъ т. г. въ стокхолмския паладиумъ първия голѣмъ говорящъ филмъ на есперанто: „Утре почва животътъ“. Тоя филмъ е билъ купенъ отъ много фирми.

Варшавската туристическа кооперация „Detur“ предлага особени услуги на есперантиститѣ. Изпитани водачи, говорещи на есперанто, очакватъ пристигащитѣ. За всѣкиго безплатно се изработва планъ и тарифа на всички желани излети изъ Полша. Пишете до „Detur“, Sienna 4, Warszawa, Polujo и искайте проспекти и сведения на есперанто, съ което ще докажете ползата отъ нашия езикъ.

Моряцитѣ и есперанто. Основаль се е наново Моряшки есп. съюзъ, който има за цель да разпространява международния езикъ между моряцитѣ и корабостроителитѣ. Търсятъ се делегати—представители въ всички пристанища. Надѣваме се и нашитѣ крайбрѣжни есперантисти да се отзоватъ. Год. вносъ е 1 шв. франкъ—само 27 лв. Адресъ: Marista ligo esperantista, sekr. Holger Ekblad, Villa Skogbocka, Viceksund, Svedujo.

Мексиканското списание „Renovacion“ за опростяване правописа е въвело есперантски отдѣлъ. Сжщото е сторило и индокитайското списание „L'Annam Nouveau“.

Международниятъ християнски есп. съюзъ, чието централно седалище е въ Quedlinburg (Германия), е ималъ много успѣшни събрания презъ време на всемирния есп. конгресъ въ Стокхолмъ. Взели сж участие приблизително 270 конгресисти отъ 19 различни страни. Имало е официално протестантско богослужение, на което сж присжтствували 600 конгресисти. Издадена е и брошура на есп.: „La religiaj cirkonstancoj en Svedujo“ и сж обнародвани подробни статии за протестантското есп. движение.

Английски есперантисти въ Бристолъ сж поканили да имъ гостува нашия съидейникъ Дим. Х. Стояновъ отъ Банско. Пратили му сж и пжтни пари въ англ. и френска валута.

Nia vivo

(La fremdlandaj esp. gazetoj estas petataj represi almenaŭ resume)

Sofia. La 7. X okazis la jarkunveno de le Sofia esp. societo. Ĝi estas disvolvinta laŭdindan agadon kaj plinombriginta sian membraron. La malnova estraro estas reelektita kun ŝanĝeto: anstataŭ Iv. Dobrev oni elektis L. Marikin, kaj rezervaj: J. Krestanov kaj f-inon E. Süßmann.

La Sofia esp. societo kunvenas ĉiusabate 8^{1/2}—10^{1/2} en la ĉambrego de la vicprezidanto de BEA, s-ano Krestanov, kiel centra kaj oportuna, str. „6. Septemvri“ № 2. La afabla domomastro rakontis esp. travivaĵojn — kiel li en Baĉkovo tutan tagon ludis rolon de germano sub la nomo Johan Kreuzmann. Poste sekvis muzikado, dancado kaj amuzado ĉe plej bona humoro.

En dua kunveno s-ano E. Kilian el Dresden rakontis pri siaj dumnoktaj travivaĵoj en Konstantinoplo. Ĉestis ankaŭ la lerneja inspektoro — nia samideano St. Kiraĝiev.

En tria kunveno s-ro Al. Dendel el Budapeŝto parolis pri sia vizito en Svedujo kaj Danujo. Interalie ĉeestis kapitano Savov el Pleven.

En kvara kunveno s-ro M. Georgiev parolis pri la mirinda apudnigramara rivero Ropotamo. Poste okazis „ludo por studo“ en plenplena salono de gesamideanoj, inter kiuj niaj fremdlandaj gastoj.

Depost kelka tempo gastas ĉe ni hungara s-ano Aleksandro Dendel kaj germana Erich Kilian. La dua intencas resti kelkajn monatojn kaj viziti la tutan landon, ricevonte senpagan ĵurnalistan bileton sur ĉiuj fervojlinioj. Li povas gvidi esp. kursojn laŭ Ĉe metodo kaj fari interesajn paroladojn. La esp. grupoj, kiuj volas aranĝi tiajn, skribu tuj al nia redakcio. Poste li forvojaĝos al Ĥinujo.

La ĉiutaga gazeto „*Slovo*“ publikiĝis en 15 sinsekvaj felietonoj la verkon „La Mondon al ni!“ de s-ro Kilian kun lia bildo, en bulgara traduko de s-ro Krestanov.

— La 15. okt. antaŭ mikrofono de Radio-Sofia la sekr. de BEA s-ro Oktomvrijski paroladis pri „Apero kaj evoluo de esperanto“. La parolado havis gran-

dan sukceson. La parolado je la 15. nov. temis pri „Esperanto kiel unua fremda lingvo“ de la sama. La 15-an de ĉiu monato okazos radio-paroladoj pri aŭ en esp., dank' al la favora rilato de la bulgara radio-ligo.

— En la legejo „Ĥristo Botjov“ la junulabstinencula s-to „Ustrem“ malfermis esperantajn kursojn: a) por komecantoj, gvidatan de Ĥr. Popov kaj b) por progresintoj, gvidanto L. Marikin. Ambaŭ kursoj okazas samtempe dufoje en la semajno: marde kaj vendrede en la ĉambroj de la legejo, 7—8 horo.

— En la legejo „Rakovski“ samideano Popov, studento, gvidas esp. kurson dufoje semajne.

— Gastas en nia ĉefurbo ankaŭ s-ano D. N. Minĉev el Konstanza (Rumanujo), red. de „Esperantistul“ kaj aŭtoro de kvin verkoj pri la bulgara literaturo en rumana lingvo. Jen kion li mem skribis al ni pri sia agado: „*Fer Esperanto por Bulgarujo*“. En mia longjara literatura agado en Rumanujo, depost la 1932 mi komencis uzi ankaŭ la trezoron de la esperantlingva libraro.

Tiel en la verko „El la historio de la Bulgara literaturo“, aperinta rumanlingve en 1932, mi prenis kelkajn interesajn informojn de la libroj „La Bulgara lando kaj popolo“ kaj „Bulgara Antologio“, kies aŭtoro estas la bonekonata s-ro Ivan H. Krestanov kaj de „Balkana konkordo“.

En la alia verko, aperinta en 1933, sub la nomo „Bulgaraj verkistoj — elektitaj paĝoj“ mi tradukis rumanlingve el la „Bulgara Antologio“ de Krestanov la rakonton „Kanto de le cigno“ de la verkistino Anna Karima.

Por skribi la verkon „El la pasinteco de la bulgaroj en Rumanujo“, kiu baldaŭ aperos, mi uzis ankaŭ la verkon de Krestanov „La Bulgara lando kaj popolo“.

Gabrovo. La 4. X. s-ro R. Triĉkov paroladis je temo „Per esperanto por la bulgara afero“, akompanita de provleciono. Plenplena salonego kaj tondraj aplaŭdoj. Granda interesiĝo kaj entuziasmo. Kurso por geurbanoj. Porinfana kurso. Kurso por gimnazianoj. Ĉiujn aranĝis nia

senlaca propagandisto Tričkov, helpata de lokaj esperantistoj.

v. Gurovo — Tetevensko. Nia s-ano Nikola Peev fervore laboras. Je honoro de trapasintaj hungaraj samideanoj estas eldonitaj belaj fotokartoj kun esperanta teksto.

Oreĥovo. La Esp. societo kaj ĉiuj adeptoj de esp.-movado en la urbo petas la altestimatan samideanon Krestanov akcepti iliajn sincerajn kaj tutkorajn dankojn pro lia bonvole farita donaco al la societa kaso por la plibonigo de la tutmonda esp. unikaĵo — insulo „Esperanto“. La senditaj de li 1000 levoj estas nepre uzotaj por la destinita celo. Aliaj esperantistoj bulgaraj kaj fremdlandaj estas insiste petataj imiti lian bonfaron. Prez. N. Kocev, sekr. D. Dilov.

— La societo malfermas dumonatan kurson, post sukcesa parolado pri la signifo de esp., de D-ro Georgi Popivanov.

Peruŝtica. Kurson gvidas kun 20 p. s-ro Cvetko Georgiev, instruisto. Granda entuziasmo. Baldaŭ societo.

Rusĉuk. La 21. X. okazis la jarkunveno de societo „Solidareco“. Nova estraro elektita: prez. Josef Kleiner, vicprez. D. Diolev, sekr. Janko Nikolov, kas. Stati Zarov, bibl. f-ino Donka Kreĉmarova, konsilantoj Iv. Kovaĉev kaj At. Krestev, kontr. kom. D. Mihajlov, K. Gagov kaj D. Naĉev. Rezervaj: Vl. Georgiev, D. Petkov kaj Iv. Kotov. Kurso por 36 kooperativanoj gvidata de Iv. Kotov. Kursoj por geurbanoj kaj por gimnazianoj. Depost la 1. XI. la societo havas propran klubejon sur la ĉefstrato vidalvide de la banko „Burov“. Ĉiuj trapasantaj esperantistoj trovos tie plej bonan akcepton. Oni organizas la feston de la 10-jara societa jubileo, samkiel de la naskiĝtago de Zamenhof koincidanta kun la tago de esp. libro. La turista sekcio forte eklaboris por pruvi, ke esp. estas lingvo servanta reale en la vivo. Adreso de la oficejo: Ivan Kotov, B. N. Banko; tiu de la societo: „Solidareco“, str. Aleksandro I, 22.

— Societo „Espero“ aranĝis paroladon pri la „Utilo de esperanto“ de la prez. s-ro Iv. Josifov, Iv. Stanĉev kaj Ĝ. Maerov. Post ĝi malfermiĝis 3-monata kurso en lernejo „Otec Paisij“ kun 24 p. gvidata de la sekr. s-ro D. Ivanov. Kun-

venoj ĉiumerkrede 7—8 h. en „Izvor“.

T.-Pazarĝik. Nova estraro elektita: prez. Iv. Konstantinov, vicprez. Ĥr. Kokatanov, sekr. Vlad. Mihajlov, kas. Dim. Gjurov, bibl. Sotir Konstantinov, kontrolkomisiono: Deĉev, Spasov kaj Demirev.

Tirnov. La 21. XI oni renovigis la societon, reelektinte preskaŭ la malnovan estraron: prez. H. Baĉvarov, sekr. Iv. Valĉanov, kas. N. Angelova, ĉiuj gimnaz. instruistoj, kontr. kom.: St. Ĥristov, progimn. instruisto, St. Ivanov kaj Ĝ. Danĉev, oficistoj. La grupo aranĝis esp. ekspozicion. Granda intereso kaj sukceso. Amaso da vizitantoj. La urbestro disponigis senpage ejon sur la ĉefa strato. Demonstraciajn kursojn por geurbanoj gvidis V. Ŝiŝkov kaj por lernantoj Iv. Valĉanov. La gimnazianoj komencis viglan esper. vivon. Sukcesaj paroladoj je temo „Per esperanto por Bulgarujo“ de s-anoj Valĉanov kaj Ŝiŝkov.

Varna. La Societo „Albatro“ en sia jara kunveno elektis novan estraron: prez. Ksenofon Jankov, vizprez. Boris Tabakov, sekr. Georgi Sapunĝiev, kas. Georgi Ĥr. Dimov, bibl. Boris Mateev, kont. kom.: Ĥr. Petrov, gimn. instruisto, membroj Kosta Nikolov kaj Georgi Nikolov. Kurso en la knaba gimnazio gvidota de Georgi Dolapĉiev, por urbanoj gvidota de Georgi Sapunĝiev, per radio gvidota de Georgi Ĥr. Dimov. La kursoj estas gvidotaj senpage, kaj la enspezoj iras en la societan kason. Adreso: Ĝ. N. Sapunĝiev, Gradska biblioteka.

De sia albana kolego nia redaktoro ricevis tre interesan leteron, el kiu ni citas parton por vidigi ĝis kie iris bulgaraj esperantistoj:

„... Post la fino de la lerneja jaro mi alveturis al Tirana kie mi restis nur du tagojn. Survoje mi renkontis vojaĝanton, kiu parolis france kaj mi tuj ekinteresiĝis demandante al li, ĉu li estas franco. Je mia miro li respondis, ke estas bulgaro. Mi do tuj diris al li, ke mi korespondas kun vi. Mia kunvojaĝanto, tuj kiam ekaŭdis vian nomon, demandis min, ĉu mi estas ankaŭ esperantisto. Kompreneble mi jesis kaj tuj ni ekparoladis en nia helplingvo. Li do diris al mi, ke vin tre bone konas, sed, jam delonge forlasinta la patrolandon, ne plu scias kion vi faras. Mi do al li sciigis, kion mi pri

vi scias kaj li tre ĝojis. Li petis min esprimi al vi, en mia unua letero, liajn plej sincerajn amikaĵojn. Li nomiĝas Nikola Iliev, inĝeniero el Plevna kaj loĝas en Port-Said. Li venis Albanujon, alvokita por organizi iun agrikulturan lernejon ĉe ni, sed mi ne scias, ĉu li ankoraŭ troviĝas tie-ĉi aŭ foriris al Bulgarujo. Eble vi jam lin renkontis... "

Esp. edziĝoj jam ofte okazas en Esperantujo. Pri tiuj en fremdlando nia bonega kolego „La Praktiko“ aperigas ankaŭ bildojn. Nun ni ĝoje anoncas, ke antaŭ 3 jaroj nia sofia samideano Boris Vasilev edziĝis kun sia esp. korespondantino en Budapeŝto. Ilia familia lingvo estas esperanto. Ĝin bonege parolas, deklamas kaj kantas ilia ĉarma 2-jara knabineto Laura. Verŝajne ŝi estas unika esperantistino en la mondo, ne scianta alian lingvon Gratulon al la feliĉa familio!

† NIAJ MORTINTOJ

Teodora G. Oreškova, edzino de nia malnova samideano Georgi Oreškov, en Burgas, 23. Marto 1934.

Anton V. Miller 77-jara, de slovaka deveno, dipl. inĝ., del. de UEA en Plovdiv, 2. Jun. 1934. La bulgaroj perdas inĝenieron, kiu faris bonegajn ŝoseojn en la Rodopa-montaro, kaj la esp.-istoj — samideanon kun alta nobleco, servintan kiel modelon al la junaj. Lian afablecon kaj gastamecon neniam forgesos tiuj, kiuj konis lin. Esperanto havigis al li ĝojon kaj viglan spiriton ĝis la lasta momento.

Petar Garkov, juna, fervora samideano en Kneĵa, 11. nov. 1934. Lia amiko Borislav Milĉev verkis poeziplenan nekrologon.

Pacon al ilia spirito kaj kondolencan al iliaj familianoj!

Bibliografio

(Duoble ricevitajn esp.-aĵojn ni recenzas, unuoble — ni nur mencias).

Enciklopedio de Esperanto, I-a volumo (A—Ĵ), 272 teksto-kaj 112 bildopoĝoj grandformataj. (La II-a vol. ampleksos proksimume 540 pĝ.) Prezo 30. — fr. sv. broŝurita, 34, — fr. sv. bindita + 10% por sendkostoj. Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esp. Libro-Amikoj, Budapeŝto, IX, Mester ucca 53. V. 5, Hungarujo.

Jen frukto de giganta laboro — grandioza verko, kiun devas posedi nepre ĉiu esperantisto por sin instrui kaj por montri al la skeptikuloj, ke esp. estas vivanta lingvo, serioza afero. La iniciatinto Pastro Ŝirjaev (bedaŭrinde tro frue mortinta), la ĉefredaktoroj Kolocsay, Kökeny kaj Bleier, samkiel la 107 kunlaborintoj el ĉiuj landoj kaj tendencoj meritas eternan dankon!

„La Mondon al ni!“ de Erich Kilian, eld. „Heroldo de Esp.“ en Köln, Germ., 70 pĝ., 1 g. m. = 33 lv. La aŭtoro priskribas en bonstila kaj facila esp. sian kaj de sia kamarado veturadon per kaŭĉuka fleksebla boato de Dreseno sur Danubo kaj Nigra-Marŝo al Konstantinoplo. Apud Varna okazis interparolo kun la bulgara reĝo, kiu fine monhelpis ilin kaj ebligis ilian hejmvrevenon. Dank' al la

bulgara gastamo kaj esperantamo ili lernis la lingvon de la Verda Stelo.

Dudekkvina Universala Kongreso de Esp. (Köln, 29. Julio — 5. aŭg. 1933). Internacia Centra Komitato de la Esp.-Movado, 11, Rue du Mont-Blanc, Genève (Svislando), 1933, pĝ. 108, prezo ne montrita. Posedinda oficiala dokumentaro esperantista.

Absolutismo, parolado de k-do E. Lanti en Antverpeno, 1934. Eldono de SAT kaj FLE, 67, av. Gambetta, Paris (XX), pĝ. 16, prezo 1 fr. Rekomendinda broŝuro pri danĝeroj de la absolutismo, kvankam ne ĉiuj samopinius.

Nova epistolo de la suno. Al ĉiuj, kiuj atendas la novan lumon de la nova sunapero, ni rekomendas tiun 4-paĝan flugfolion. Havebla ĉe „Nova Kulturo“ en Seviievo, Bulgarujo.

Norda Literaturo, kolekto de literaturaj verkoj el Norda-Eŭropo. Redaktas T. Indra ĉ. d. de UEA por Latvujo. Eldonas K. Srtazds, Jeglava, Latvujo, p. k. 51, unua libro, paĝoj 84 kaj 1 ilustraĵo. Enhavas 4 rakontojn, tradukitajn en facila, perfekta esp. stilo. La rakontoj estas tre interesaj, kun alta literatura indeco. Ĉiu broŝuro kostas 20 levojn aŭ

0.60 sv. fr. La broŝuroj estos pagataj post la ricevo. Malmultekosta, literatura legaĵo. Rekomendinda al ĉiuj esperantistoj bulgaraj.

La Influo de Vegetarismo al la morala kaj socia progresado de Karl Nebenzahl. № 1 de la biblioteko „Vegetarano“, Eldonejo „Vegetarano“, Bukureŝto, V, str. Dr. Istratè, 10, Rumanujo. Pĝ. 34, prezo 2 fr. Rekomendinda libreto pro sia instrua enhavo kaj bona lingvo.

La juna vivo, dusemajna organo por la junularo, red. k. adm. West-Graftdijk (N. H.), Nederlando, jarabono 1 hol. floreno aŭ 58 levoj.

La aperintaj n-roj donas interesan enhavon en bona Zamenhofa lingvo.

Banurbo Aachen, faldprospekto ilustrita pri tre malnova urbo — moderna restadejo. Ricevebla ĉe la urba Kurakaj Fremdul-oficejo, Aachen, Monheims-Allee, Germanujo.

Danlando — dumtempe la plej malkara turistlando, ilustrita faldprospekto, ricevebla ĉe: Turistforeningen for Danmark, Vestre Bd 18, Kopenhago.

Princlando Liĥtenstejno, ilustrita prospekto en angla, franca, itala kaj esperanto. Senpage ĉe Liechtensteinischer Verkersverein, Vaduz, Liechtenstein.

Bulgario — Varna, la Reĝino de la Nigra Maro, nova, blue ilustrita faldprospekto, ricevebla ĉe la oficejo por somerrestado en la komunumo, Varna.

Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, Paris, Esp. Centra Librejo, 11, Rue de Sèvres, (6-e), 1934, pĝ. 32, Prezo 2 fr. Enhavo: Regularo de L.K., Nomaro de la Lingva-Komitatoj, Zamenhofa sistemo pri landnomoj.

Katalogo de libroj — Eldona Societo Esperanto, Poŝta Fako 698, Stockholm, Svedujo.

Свѣтътъ въ заритѣ на Зелената звезда (La mondo en la radioj de la Verda Stelo) de Georgi N. Sapunĝiev, Varna, presejo „Vzaimnost“, 1934, pĝ. 80, prezo 15 lv.

Jen malmultekosta esp. propagandilo en bulgara lingvo. Malgraŭ kelkaj eraraj datoj kaj ŝveligitaj faktoj, tuj ĝin mendu kaj disvendu, se vi deziras kontribui al

la disvastigo de esp. por la monda frateco kaj paco.

Ключъ Есперанто, bulgara ŝlosilo, malgranda formato, pĝ. 42, prezo 5 lev j, mendebla ĉe librejo „Esperanto“, Sofia. Enhavas la gramatikon, ekzercojn kaj universalan vortradikaron kun aldono de komerca vortareto. Tiu nova eldono estas sur bela papero, kun klara preso kaj ni varme rekomendas ĝin.

Marŝalo Jozef Pilsudski, de W. Sieroszewski, prez. de Pola Liter. Akademio, tradukis kaj komentariis Mgr. Fil. B. Strelczyk, 53 pĝ., prezo ne montrita, eldonis Pola Esp. Asocio, Warszawa 1934. Biografio de la pola ŝtatprezidanto sur bela papero, en bona stilo kaj akompanita de lia bildo. Oni diru, kion oni volas kontraŭ certaj ŝtatuloj, sed oni ne povas malkonsenti kun ni, ke la pola marŝalo meritas la sinceran amon de sia popolo pro siaj pura karaktero, pruvita malegoismo kaj simpla vivmaniero. Li dediĉis sian tutan vivon al la ideo de libera Polujo, kiu lastatempe leviĝas kiel granda potenco, ludonta gravan rolon sur nia kontinento.

Vic kaj arkeologia muzeo ilustrita faldprospekto. Senpage ĉe „Sindikato de Turismo“ en Vic (Hispanujo — Katalunujo).

Cankar: „Servulrajto“ — prilaboris en versoj D-ro J. Stefanĉiĉ. Formato 12×20, pĝ. 68, eldonis „La suda stelo“ Slav. Brod (Jugoslavio). Arta fotomuntaĵo speciale por la esp. eldono. Prezo 2 sv. fr. aŭ naŭ internaciaj respondkuponoj.

Esp. bildkartoj kun klarigoj pri la sufiksoj *igi* kaj *igi*. Unu serio kostas 15 germ. pfenigojn aŭ unu respondkuponon. Eldoninto: Carl Walter, Graf-Speestr. 24, Berlin, W. 35, Germ.

Ŝto e ckultism (kio estas okultismo) de Sava Kalimenov, en bulgara lingvo, 48 pĝ., rezo 6 lev j, senpage por abonantoj de la semajna gazeto „Bratstvo“ en Sevlievo, Bulgarujo.

Morski pesni (maraj kantoj) de Dim. Dobrev, antaŭparolo de Dim. Aĝarski, en bulgara lingvo, 70 pĝ., prezo 10 lv., havebla ĉe S. Simeonov, libristo, Ruse, Bulgarujo.

La décadence politique de l'Europe et l'Instauration du

libre-échange (La politika dekadenco de Eŭropo kaj la starigo de liber-ŝanĝo) de B. M. Trucco, S-té A-me Hallesint Edizioni d'Italia, 34, Via delle Finanze, Roma, Italia, 1930, Pĝ. 107, prezo 9 fr., akompanita de dupaĝa resumo en esp.

Tiu ĉi interesa libro predikas novan internacian movadon: *Halesismo* — ekonomia sistemo de universala kooperado kaj justeco, praktika vojo por realigi la novan vivon de harmonio, paco kaj frateco inter la popoloj. Laŭ la decido de l' aŭtoro, esp. estas ekceptita kiel oficiala lingvo de tiu organizo kaj pro tio ĝi meritas specialan intereson flanke de l' esperantistaro.

I. H. K.

RICEVITAJ GAZETOJ

Aganto, Argentina Esp., Aŭstra Esp., Belga Esp., Brazila Esp., British Esp., Bulteno de Ĉeĥosl. As. Esp., Bulteno de Int. Sc. As. Esp., Esperantistul, Espero Katolika, Franca Esp., Heroldo de Esp. Hispana Esp. Gazeto, Hungara Heroldo, Intern. Medecina Revuo, Informilo, Interligilo de P. T. T., Intern. Pedag. Revuo, Internac. Transportlab. Federacio, Laborista Esp., La Juna Vivo, Kantona Esp. Gazeto La Komercio, La Mondo, L' Espero, L' Espérantiste Sisteronnais, Literatura Mondo, Lingvo Intern., La Suda Kruco, La Suda Stelo, La Revuo Orienta, La Verdemulo, Nia Gazeto. Norvega Esp., Nia Stelo, Nova Horizonto, Ondo de Daugava, Pola Esp., Sennaciulo, Sennacieca Revuo, Sveda Labor. Esp., Turismi Teataja, Verda Mondo, Zamenhofa Esperanto, Justice et Vérité, Фаръ, Аптек. Защита, Братство, Желѣзнич. Подемъ, Тракиецъ, Трезва Борба, Добро Здраве, Свѣтъ и Наука, Здравъ Животъ, Курортно Дѣло, Автомобилизъмъ и Туризъмъ.

AL ĈIUJ KUNLABORANTOJ

Skribu klare, sur unu flanko de l' papero, kun larĝaj margenoj. Sendu nur konscizajn raportojn. Tempo estas mono, kaj monon ni ne havas — ni laboras senpage. Tial la malklare kaj krajone skribitajn manuskriptojn ni ĵetas en la paperkorbon.

Distingo

Nia redaktoro S-ro Krestanov, unika lingva-komitatano kaj dumviva membro de UEA en Bulgarujo, estas elektita ano de la Konsilantaro de la Espranto-movado. La sama ricevis dankleteron de Lia Reĝa Moŝto pro utilaj priesp. informoj al la Kortego kaj monpremion de la Libera Universitato pro diplomatia konkurstezo.

Korespondi deziras:

S-ro Todor A. Todorov, 24-jara, pastro, v. Bogdanlia, Novoselsko, Bulgarujo, kun pastroj, verkistoj aŭ artistoj el ĉiuj landoj.

F-ino Gjura Ivanova, ul. P. Dejan, 9, Sofia, Bulgarujo.

S-ro Tamato Ŝosuke. Ĉe Ikujo-Renbai, 51. Macukaze, Hakodate, Japanujo.

S-ro Rudolf Mayer, Hauptstr. 165, Gersdorf, Bez. Chemnitz, Sa, Germ.

S-ro Mendes Dereso, Pateo Albers, 18, 1-o E. Barreiro, Portugalujo.

S-ro Bernard Chateau, E. P. S. Guinot, Amboise (S. et L.), Francujo.

S-ro Josefo Matoušek, stud., Ĉeská Trebová 945, Ĉeĥosl., interŝanĝas poŝtmarkojn.

Senpage mi sendas esp. librojn novajn al ĉiu, kiu sendas al mi aer- aŭ jubileajn pm. el iu ajn lando. Kalkulo 5 Yvert fr. = 1kĉ. Difektitaj ne estas akceptataj. Sendu rekomendite al H Röllig, Gablonz a/N, Wassergasse 7-a, Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ interĝanĝo de pm. laŭ Yvert 1935.

Rapidi!



Бързайте!

За ускоряване издаването на илюстрираното съчинение „По Европа съ Esperanto“ (пјтни бележки и впеления презъ 30-год. esp. животъ) на esp. и бълг. паралелно, се приематъ абонати до 30. дек. т. г. по 75 лв; после книгата ше струва двойно.

За сжщата цель се отстѣпва и „Пълниятъ двоенъ речникъ на esp. съ граматика“ за 55 лв. и „Българска Антология“ (илюстрирана читанка на esperanto) за 50 лв. Прибавете 5 лв. за пощ. рѣзноски и препорѣжка.

Адресъ: Ив. X. Кръстановъ ул. 6. Септемврий, 2, София.